

N-ro 158-159 somero-vintro 2013

ISRAELA ESPERANTISTO



ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

Azia Kongreso en Jerusalemo, IJK en Nazareto, UK en Islando...



Redaktoro Amri Wandel
Provlegantoj Eldad Salzman
 JehoŝuaTilleman
ELI -Prezidanto Amri Wandel

Redakcia adreso
P.O.K. 22041, 6122001 Tel-Avivo
eli@esperanto.org.il

Retejo: <http://esperanto.org.il/ie.html>
Fondita 1959 kiel 'Nia Ligilo'.
Kovrilo: Grupaj fotoj de la 7-a Azia Kongreso en Jerusalemo kaj de la 69-a IJK en Nazareto
Grafiko kaj fotoj: A.Wandel

Abontarifo eksterlanda: 10 EUR.
Eblas pagi per UEA-konto *elia-q*
aŭ mendi ĉe UEA.



Karaj legantoj, grandparte tiu ĉi numero temas pri la du internaciaj kongresoj lastatempe okazintaj en Israelo – la Azia Kongreso kaj la IJK, kun pluraj buntaj kontribuoj de la eksterlandaj partoprenantoj.

Sekvas raportoj pri la 98-a UK en Rejkjaviko, pri nova, agrikultura ZEO –akvomelono nomata Esperanto kaj pri ELI kaj UEA en Jad Vaŝem – unuafoje en Esperanto. Fine sed ne laste ni funebras nian karmemoran Esti Saban *Amri*

Enhavo

- 3 La 7-a Azia Kongreso en Israelo *Amri Wandel*
5 Paco, kio estas tio? *Renato Corsetti*
7 Du neforgeseblaj semajnoj en Israelo *Nina Pietuchowska*
9 Israelo, kie komenciĝis mia revo *Ping Zhang*
13 Eŭritmio dum la Azia Kongreso kaj la IJK *Tali Wandel*
15 Kial estas inde viziti en Israelo *Joela Egozi*
17 Bloge tra la Azia Kongreso en Israelo *Amri Wandel*
34 Impresoj de la 98-a UK en Rejkjaviko *Tsvi Sadan*
36 IJK en Nazareto – TEJO kongresis en Israelo *A. M. Konicpolska*
39 Mia unua kongreso *Daria Yoeli*
40 Post IJK-ekskurso en Israelo *Rafael Henrique Zerbetto*
45 Akvomelono "Esperanto" *Gian Piero Savio*
47 Jad Vaŝem: ELI kaj UEA anoncataj unuafoje en E-o *Amri Wandel*
48 ELI funebras: Esti Saban *Amri Wandel*

La 7-a Azia Kongreso en Israelo

Revuo *Esperanto*, Junio 2013

Amri Wandel

La 7-a Azia Kongreso de Esperanto okazis la 18-22an de Aprilo en Jerusalemo. Tri jarojn pli frue, kiam Israelo invitis la kongreson, la reago de pluraj aktivuloj de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado de UEA) estis "Israelo ja troviĝas en Eŭropo, ĉu ne?" Tamen, dum la 6-a Azia Kongreso en Mongolio en 2010, KAEM oficiale decidis okazigi sian sekvan kongreson en la jaro 2013 en Israelo. Aldone al la kleriga kaj arta programo de la kongreso, la partoprenantoj povis partopreni 4-tagan antaŭkongreson en la norda parto de Israelo, duontagajn ekskursojn en Jerusalemo kaj apude dum la kongreso, kaj 5-tagan postkongreson en la suda parto: la Morta Maro, Eilat, la Ruĝa Maro kaj Petra (en Jordanio). Tiu turisma programo reflektis ankaŭ la kongresan temon: "Ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo". Kiel distra teamo estis kontraktitaj Kajto, kaj denove Jomo, kiu sukcesege koncertis en la pasintjara Israela

Kongreso. La bezono informi al la tuta Esperantujo spronis la rapidan konstruon de nova retejo kun aparta paĝo por la kongreso (<http://www.esperanto.org.il/ak2013.html>). Iom-post-iome akumuliĝis tie informoj pri la Azia Kongreso: Unua kaj Dua Bulteno, turisma programo, reta aliĝilo, kaj listo de aliĝintoj. Entute aliĝis ĉ. 160 personoj, el 26 landoj, inter ili la plej grandaj grupoj venis el Israelo (62), Japanio (20) kaj Ĉinio (14). La ĉina delegacio estis ankaŭ gvidita de la plej altranga kongresano – vicministro en la ĉina registaro. La kongresa programo estis tri-parta: en la mateno ĝis la posttagmezo – ekskursoj en kaj apud



Jerusalemo, ĝis la vespermanĝo – kleriga programo (prelegoj), kaj post la vespermanĝo – arta kaj distra programo.



Grupa foto en Jerusalemo dum la Azia Kongreso

En la inaŭguro salutis la vicurbestro pri kulturo kaj arto, estis legita la saluto de la prezidanto de UEA, kaj parolis la eliranta kaj novelektita prezidantoj de KAEM. La dumkongresa ekskursiva programo konsistis el kvar ekskursoj en Jerusalemo: la okcidenta apudurba regiono – la Holokaŭsta Muzeo Jad Vaŝem kaj la araba vilaĝo Abu-Goŝ, kie oni gustumis la plej bonan orientan manĝon; la orienta apudurba regiono – Oliva Monto kaj natura promeno en la rivero Kelt; la antikva Jerusalemo – la Templo Monto, la Tombo Preĝejo kaj la Lamenta Muro; kaj la moderna Jerusalemo – la Kneset (parlamento) kaj la Israela Muzeo. En la kleriga programo estis prelegoj pri tre variaj temoj – i.a. pri Indonezio, infanedukado en Vjetnamio, ĉina opero, la cunamo-katastrofo en Japanio. Okazis debato pri la paco en la Mezoriento, gvidita de Renato Corsetti, kaj prelegoj pri moderna pentrado en Israelo. KAEM elektis novan prezidanton – s-ron Ruixiang Wang el Ĉinio kaj la venontan landon por la 8-a Azia Kongreso en 2016: Ĉinio. En la arta programo ĉefrolis la mirindaj Kajto kaj Jomo, kiuj kantigis kaj dancigis la kongresanojn de ĉiuj aĝoj. Krome aperis israelaj danc-grupoj, orienta (ventro-) danco kaj

eŭritmia dancado. Plej vigla kaj riĉa estis la internacia vespero, kiu estis tute spontanea. Antaŭ la kongreso ĉ. 30 personoj partoprenis la 4-tagan ekskurson al Jafo, Hajfo, Akko, Nazareto kaj la Tiberiada Lago. Post la kongreso ĉ. 30 kongresanoj partoprenis 5-tagan ekskurson al Jeriĥo, La Morta Maro, Masada, Eilat, la Ruĝa Maro kaj al Petra, la nabatea antikva urbo en Jordanio. Organizis Amri Wandel (kongresejo, gastejoj, programo, informado, transportado, ekskursoj dum la kongreso, postkongreso), Jehoŝua Tilleman (kasisto, invitletoj, antaŭkongreso), Tsvi Sadan (retejo, aliĝoj), Gila Wandel (loĝigo).

Fotoj: Konciza bildaro (84 fotoj) de la Azia Kongreso kaj Postkongreso <https://picasaweb.google.com/104206151883892331911/AziaKongresoDeEsperantolsraelo2013>. Pliaj fotoj kaj raportoj – fine de la kongresa retpaĝo menciita ĉi-supre.

Paco, kio estas tio?

La debato pri paco en la Meza Oriento okaze de la Azia Kongreso

Renato Corsetti, Italio

Paco estas bela vorto kaj ĝi estus ankaŭ bela koncepto, se ĉiuj komprenus ĝin en la sama maniero. Bedaŭrinde, por multaj paco estas la manko de milito. Tio ĝi estis por la antikvaj romianoj, kiuj kreis la sloganon "Se vi volas pacon, pretigu militon!" La romianoj, finfine, ne estis tiel antikvaj, ĉar tute modernaj homoj kiel Obama aŭ Netanjahu diras la samon.

Neniu volas kompreni la aferon, kiel oni devus, ke paco estas paco nur kiam ĝi estas paco en justeco. Se unu flanko gajnas, la rezulto ne estas paco, sed milito post unu generacio. Pensu pri la fino de la unua mondmilito, kiam la franca prezidento volis montri al ĉiuj, ke Francujo venkis kaj Germanujo malvenkis. La pac-kontrakto de la unua mondmilito kun pezaj kondiĉoj por Germanujo estis unu el la faktoroj de la posta milito.

Se oni volas paroli pri paco en la Meza Oriento, oni povas fari tion nur en esperantista medio, ĉar en la normala mondo vi tuj estas atakata de ĉiuj flankoj: vi estas cionisto, kiu volas forpeli la arabojn kaj preni ties teron aŭ, male, vi estas amiko de la teroristoj, kiuj mortigas senkulpulojn per siaj atencoj. Ne ekzistas alia ebleco.

La israelaj esperantistoj ĉeestintaj la debaton apartenas al la parto de Israelo, kiu iom pli racie provas aliri la aferon, kaj kiu esperas pri vera paco kun almenaŭ parto de justeco. La aziaj esperantistoj ĉeestintaj ne vere havis tre fortajn opiniojn pri la tuta afero, aŭ ne vere emis esprimi ilin tre klare, kiel faras la barbaraj eŭropanoj aŭ israelanoj.

En la fino estis evidente, ke en Israelo estas tri pensfluoj:

1) Ni prenu ĉion ĝis la rivero Jordano. Ĉi tiu finfine estas nia historia lando, ĉu ne ankaŭ Samario kaj Judeo? Kaj kio pri la arabaj loĝantoj? Ili foriru aŭ akceptu nian regadon.

2) Ni restu kiel ni estas nun kun klara israela forta pozicio kaj ni iom donu al la palestinanoj nur se ili unue subskribas pac-interkonsentojn laŭ nia plaĉo, kun la kolonioj en la okcidenta riverbordo.

3) Ni havu du ŝtatojn por du popoloj kaj ĉiu restu en sia teritorio.

Laŭ mia kompreno (sed mi diru, ke temas pri tute persona kompreno) israelaj esperantistoj moviĝas inter la 3-a kaj la 2-a pozicio, dum granda parto de la israela socio apartenas al la unua pozicio.

Kaj kion pensas la alia parto, la araboj, kiuj ne estis reprezentitaj en la debato (krom de mi, honora arabo). Vi eble ne volos kredi tion, sed la araboj estas kiel la israelanoj. Ankaŭ ili havas tri poziciojn:



La aŭtoro parolas dum la debato

- 1) Israelo devas malaperi el la Meza Oriento. Ili redonu la teron, kion ili forrabis, ktp.
- 2) Ni havu du ŝtatojn por du popoloj, kaj ĉiu restu en sia teritorio.
- 3) Israelo restu, kie ĝi estas nun, sen la kolonioj en la Okcidenta Bordo.

Evidente la sola ebleco renkontiĝi estus per la solvo "du ŝtatoj por du popoloj", sed tio, laŭ mia opinio, ne estos ebla dum la dekstra kaj centra-dekstra Israelo voĉdonas por Netanjahu kaj similaj. Se esperantistoj regus en Israelo, kaj en arabaj landoj, la solvo estus pli facila.

Du neforgeseblaj semajnoj en Israelo

Nina Pietuchowska, Pollando

De multaj jaroj mi revis pri vojaĝo al Israelo, kie troviĝas lokoj gravaj por tri religioj. Kiam mi eksciis, ke la azia kongreso okazos en Jerusalemo, mi tuj decidis: ne estos pli bona ebleco por mi – samtempe du aferoj: Israelo kaj Esperanto. Antaŭ mia vojaĝo mi tralegis la gvidlibron pri la lando, kaj notis informojn pri lokoj, kiujn mi ŝatus vidi. Kiam mi ricevis la programon de la antaŭkongreso, kongreso kaj postkongreso, mi ekvidis en ĝi preskaŭ ĉion, kion mi ŝatus vidi.

Mi veturis sola, "mia animo sidis ie sur mia ŝultro" - en kiu lingvo mi povos interparoli en la telaviva flughaveno? Esperante...? Ne eblas. La hebrean mi ne konas, la anglan kaj germanan nur iomete... Finfine okazis, ke ne estis problemo – helpis la rusa, kiun mi bone konas kaj senprobleme mi povis respondi je ĉiuj demandoj. Poste, tre malfrue nokte per taksio kun same ruslingva ŝoforo mi atingis la hotelon, kie dormis jam la antaŭkongresanoj.

Dimanĉe (14an de Aprilo) frumatene komenciĝis la antaŭkongreso. Ni vizitis antikvan Jafon kun Gabi Zeevi, poste trajne ni veturis al Hajfo por renkonti Jehoŝua Tilleman. Li akompanis nin dum promenado tra la urbo, dum ekskurso al Roŝ-Hanikra kaj Akko. Belegaj kaj vizitindaj estas la Bahaaj Ĝardenoj en Hajfo.

Interesege estis la ekskurso al Nazareto kaj ĉirkaŭ la Tiberiada Lago, kiun gvidis Amri Wandel. Finfine trajne kaj buse ni venis al Jerusalemo, kie

La aŭtorino (tenas la flagon) dum la postkongreso



startis la kongreso. Ĝia programo estis ege riĉa: matene ekskursoj tra la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, posttagmeze diversaj prelegoj, diskutoj, vespere arta programo (Jomo, Kajto, Jomo+Kajto, orienta kaj eŭritmia dancoj, internacia vespero, babiladoj kun malnovaj/novaj amikoj, nokte filmoj aŭ promenado tra la urbo. Ne estis tempo por satdormi...

La polaj kongresanoj organizis kroman ekskurson al Betleĥemo. Post la fino de la kongreso startis la postkongreso: ekskurso kun Amri suden tra Jeriĥo, Kumran, Ein Gedi apud la Morta Maro kun neforgesebla flosado, la salkaverno, Masada, Ein Bokek, Sodomo kaj fine al Eilat.

Ĉirkaŭas ĝin la dezerto Negev, kie ni vizitis la arkeologian parkon Timna kaj la kanjonon de Salomono, interese estis vidi 4 landojn de la pinto de monto Cefahot.

En Eilat parto de la postkongresanoj restis kaj kun Jael Ŝelah vizitis la urbon kun ĝiaj vidindaĵoj; la alia parto vizitis en Jordanio la faman en la tuta mondo urbon Petra. La loko estas neimageble belega, neforgesebla; ŝajnas, ke ĝia loĝantaro foriris el ĝi hieraŭ, en ĝi la tempo haltis... Tiuj, kiuj restis en Eilat, povis vidi la subakvan vivon de la Ruĝa Maro kaj naĝi en ĝi. Sur la revenvojo al Tel-Avivo ni vizitis la belegan Ruĝan Kanjonon, la interese gan krateron Ramon kaj la dezertan urbeton Micpe-Ramon.

Dum miaj du semajnoj en Israelo estis 4 festaj tagoj: 2 sabatfestoj, la Tago de Sendependeco (en Hajfo, vespere, el la Monto Karmel mi havis eblecon vidi belegajn piroteknikaĵojn), la Tago pri Pereintaj Soldatoj. Ŝoke por mi estis, ke dum ĉi tiuj tagoj preskaŭ ĉio stagnas, stratoj estas malplenaj, eĉ en gastejoj aŭ hoteloj estas problemoj pri enloĝigo.

Du semajnoj, dum kiuj mi estis en Israelo, permesis nur iomete ekkoni la landon, multajn historiajn, turismajn lokojn, kutimojn, ĉiutagan vivon. Valoras reveni ĉi tien!

Koran dankon al ĉiuj organizantoj de la kongreso. Via laboro estis malfacila, komplika sed fruktodona. Ŝajnas al mi, ke ĉiuj gekongresanoj revenis hejmen feliĉaj kaj kontentaj same kiel mi, malgraŭ etaj miskomprenoj dum la kongreso.

Israelo, kie komenciĝis mia revo

Zhang Ping (Ĝoja), Ĉinio

Post la 7a Azia Kongreso de Esperanto (AK), mi estis petita de Amri Wandel verki artikolon pri mia sperto de la kongreso kaj pri impresoj de Israelo. Mi tuj konsentis, sed kiam mi komencis verki mi rimarkis ke tio ne estas facila kiel mi supozis. La 20-taga travivaĵo en Israelo ŝajnas al mi rara trezoro. Mi nek kapablis nek volis ellasi eĉ unu el la spertoj, kiuj plenigis mian bruston, sed mi ne trovis taŭgan manieron kiel komenci. Ĝis post kiam mi sukcese finis mian prelegon en la 98a UK en Rejkjaviko. Tiunokte subite kaptis min la titolo "Israelo, kie komenciĝis mia revo". Jes, tio estas la ĝusta!

Sorto estas magia, oni ne scias, kio okazos en la venonta sekundo

La 26an de Julio en la halo Lapenna de "Harpa", la kongresejo de UK en Islando, samideanoj aplaŭdis mian prelegon pri ĉina arto, Kunqu-Opero. La aplaŭdo estas konata. Jes, sama varma aplaŭdado sonis en Aprilo en Jerusalemo, Israelo, kiam mi unufoje faris tiun prelegon. Tiam subite nigriĝis la ekrano, per kiu mi prezentis la filmojn kaj bildojn, kaj silentis la sono. "Ho, kion fari?" Mi klare aŭdis mian korbatojn. Neatendite varmega aplaŭdado rompis la silenton, kaj el la okuloj de la samideanoj brilas penigo por mi. Mi subite posedas forton kaj kuraĝon daŭrigi mian prelegon sen mikrofono kaj sen ekrano, ĉar mi havas la subtenon de la samideanoj.

Bonŝance post momento refunkciis la ekrano, ĉio estas refoje enorde. Feliĉo leĝon ne obeas, ĉu?

La aŭtorino prelegas dum la Azia Kongreso

Kompatemaj samideanoj

Kion signifas esti samideano? Antaŭ la Azia Kongreso mi ne havis respondon. Nun mi ĝin trovis. Dum la AK okazis tertremo en Sichuan, la provinco de Ĉinio. Antaŭ 5 jaroj ĝuste en Sichuan okazis granda tertremo, kiu mortigis multajn personojn kaj detruis milojn da feliĉaj familioj... Ricevinte la informon, mi urĝas por la perdiĝantoj kaj malĝojas por la viktimoj.

Neatendite, komence de la posttagmeza programo, Amri informis la ĉeestantojn pri la tertremo. Tuj kelkaj esperantistoj sidantaj apud mi demandis pri la progreso de la savado de viktimoj kaj esprimis simpatian. En la postaj tagoj pluraj ĉeestantoj esprimis zorgon, kompaton kaj simpatian. Oni ankaŭ honoris per silento la memoron al la viktimoj. Kvankam mi sole ĉeestis la kongreson, tamen en tiuj tagoj mi ne estis sola. “Ĉio pliboniĝos!” Samideanoj diris al mi.



“Unuafoje”

En Israelo mi **unuafoje** prelegis, **unuafoje** uzis subakvan maskon kaj vidis la ĉarman submaran mondon kaj **unuafoje** grimpis per ŝnuro (kvankam ĝis nun mi ankoraŭ ne ŝatas la ŝnuron. HOHO) Estas tiel multaj **“unuafoje”!**

Mia unua prelego okazis pro renkontiĝo kun Amri. En Aŭgusto 2012 partoprenante en monda konferenco de astronomoj en Pekino, li vizitis mian radion (Ĉina Radio Internacia) kaj filmis sian prelegon pri astronomio. (Laŭ mi, la fako astronomio estas ege malfacila, sed sufiĉe interesa. Amri opiniis, ke en Ĉinio pli multaj fraŭlinoj lernas la fakon ol en aliaj landoj. Se vere, mi ege volas scii la kialon.)

De Amri mi aŭdis pri la AK kaj naskiĝis la penso pri prelego en ĝi. Sed mi timis, ĉar mi ne faris prelegon antaŭe kaj estas nekonata por multaj esperantistoj; ĉu la AK volas akcepti min?

Amri tuj konsentis al mia propono pri la prelego. Li eĉ helpis min kontakti respondeculon de lia universitato por prelego en ĝi. Ne nur mia prelego en AK sed ankaŭ la posta prelego en UK okazis pro li. Li kondukis min al la nova mondo: prelegvojaĝo.

Uzadon de subakvuma masko en la Ruĝa Maro instruis al mi la samvojaĝanoj de la postkongresa ekskurso. Kvankam mi lernis naĝadon kaj povis naĝi en la maro, mi ankoraŭ timas la maron. Mi ĉiam opinias, ke ĝi posedas teruran forton.

La ĉielo estas tiel blua kaj pura, la Ruĝa Maro vasta, kaj en ĝi naĝas multe da personoj per koloraj maskoj. Sed tio ne kuraĝigis min. “Mi certe estas freneza!” mi pensis vidante la maskon en miaj manoj. “Ĝoja! Sekvu min, mi vin instruos!” “Jes! Mi ne timas.”

“Unue prenu la maskon ĉi tie, poste... Se akvo eniros, vi devas... Kuraĝu!”

“Ĝoja! Vidu min, mi faras ekzemplon!...”

Ho, miaj karaj samideanoj, unu post la alia, komencis instruadon.

“Bone! Mi estas preta. Ruĝa Maro, mi venas!”, mi diris al la maro.

Akvo eniris... Ho, la akvo estas ege sala!

Ho, mi vidis la kolorajn fiŝetojn..., sed akvo refoje eniris en la maskon, poste en la buŝon kaj en la gorĝon. Mi sentis, ke mi naĝas en salo, ne en akvo.

“Ĉu via masko ne estas bona? Do, prenu la mian” Amri diris kaj donis sian maskon al mi.

Jen, tiel estas mia unuafoja maskosperto! Ĝia gusto estas sala kaj dolĉa! Mi unuafoje vidis la mirindan submaron! “Unuafoje” ĉiam estas neforgesebla, ĉu ne?



La aŭtorino naĝas dum la Postkongreso

“Vi kapablas!”

Kie troviĝas ŝtupoj? Nur rokoj glataj, altaj kaj krutaj.

Antaŭ mi Amri, mia ĉiĉerono, marŝas kviete kaj rapide kiel en la tagoj de la postkongresa ekskurso.

Apud mi estas Eran, la patro de Ofri, aminda knabineto, la plej juna partoprenantino de la Azia Kongreso. Li portis strangan koloran ĉapon kaj la “teruran” ŝnuron. Li amas la ŝnuron, sed mi **ne**. Kial? Ĉar mi ne uzis ĝin antaŭe, kaj ankoraŭ ne volas uzi ĝin estonte.

“Ĉu vi ankoraŭ volas marŝi plu? Nun ankoraŭ eblas reveno, poste ne plu!”, murmuris Eran ĉe miaj oreloj.

Tio estas la komenco de mia lasta postkongresa ekskurso, ankaŭ la lasta de mia vojaĝo en Israelo: Grimpado en la kanjono Daraĝe, apud la Morta Maro. Kion cetere signifas la nomo Daraĝe? Ĉu eble indikas danĝeron?

La roko altas je pli ol 10 metroj, kompreneble sen ŝtupoj, sube estas akvo, sed ni ne scias, ĉu ĝi estas profunda! “Mi estas bonŝanca, ĉar mi scipovas naĝadon. Tamen mi ne scias kiel uzi la ŝnuron...” Ĵus kiam mi pensis, Amri diris al mi:

“Vi kapablas!”

Mi amis la parolon, ĝi kuraĝigis min, sed tiam iom malŝatis ĝin; ĉar tio signifas, ke mi ne povas elekti forkuron, ne povas reveni laŭ la propono de Eran, ne povas diri: “Mi estas virino!” Eblas nur unu elekto: grimpi kaj naĝi.

Mia ĉiĉerono Amri ĉiam plenas je fido pri mi (ĝis nun mi ne scias la kialon); pro lia fido, mi posedas kuraĝon.

“Unue la sako, poste Ĝoja!” (Amri unue grimpis suben, poste transportis mian sakon, poste estas mia vico en grimpado, kaj fine Eran). Eran ne plu havas ŝancon reveni, nun komencas ŝerci pri mi. Kaj mi tute ne havas energion kaj emocion atenti lian ŝercon. Ĉar nun la ŝnuro ŝajnas al mi ruza serpento, kvankam ĝi estas tiel obeema en la manoj de Amri kaj Eran.

Pum!

Malbona tenado de la ŝnuro kaŭzis mian rektan falon en la profundverdan basenon laŭ la glata surfaco de la klifo. Mi tute malsekis, de kapo ĝis piedo.



Kiam mi embarasita naĝis al la bordo, mi vidis la ŝnuron gaje flosanta ĉe la surfaco, kaj Eran brile ridas! Efektive, Eran multe zorgis pri mi dum la grimpado.

“Ĝoja sukcesis!” atentigis min la gratulo de Amri, ke mi venkis la rokon, kion mi ne faris antaŭe.

“Vi kapablas!”, refoje sonis la parolo.

Jes, mi kapablas kaj sukcesis. Kaj mi ekŝatis la danĝeran vojon!

Dum la vojo mi ankaŭ renkontiĝis kun kelkaj israelaj ekskursantoj; inter ili du 7-aŭ-8-jaraĝaj israelaj knaboj sekvis sian patron kaj kiel plenaĝuloj grimpis sur la rokoj. En iliaj okuloj ne troviĝas timo, sed plena memfido. Tio profunde tuŝis min. Kial israelanoj kapablas planti grenojn, legomojn, fruktojn kaj aliajn abundajn agrikulturajn produktaĵojn kaj sin vivteni en la dezerta tero? Kial Israelo venkis multajn militojn? Kaj kial Israelo posedas monde la plej progresintajn teknikojn kaj sciencojn?... “Vi kapablas!” – eble tio estas la respondo.

Eŭritmio dum la Azia Kongreso kaj IJK

Tali Wandel

“Ĉiu sono kreiĝas el movo kaj ĉiu sono kreas nevideblan movon en ĉiu el ni”.

Dum la jaro 2013 okazis du tre gravaj esperantaj eventoj en Israelo. La 7-a Azia Kongreso, en Aprilo, la unuan fojon en Israelo, kaj la 69-a Internacia Junulara Kongreso, en Aŭgusto, la duan fojon en Israelo. Inter la esperantistoj, el proksime kaj fore, estis ankaŭ kelkaj, kiuj unuafoje vizitis Israelon, aŭ internacian Esperanto-eventon, aŭ eĉ unuafoje vizitis alian kontinenton. Unu kroma afero, kiu envenis Esperantujon verŝajne je la unua fojo dum tiuj du kongresoj, estas unika speco de arto, relative nova: 25 jarojn pli juna ol Esperanto. Tiu ĉi arto videbliĝas per tre specialaj movoj, personaj kaj koregrafiaj, koloraj lumoj kaj specialaj silkaj vestaĵoj; movoj, per kiuj la



La aŭtorino prelegas pri eŭritmio

homa parolado kaj muziko influas la tutan homan organismon. Ĝi nomiĝas "eŭritmio", kaj estis evoluigita de la spirita scienco antropozofio, far d-ro Rudolf Steiner kaj liaj kunlaborantoj, ekde 1912. Krom ĝia arta praktiko, eŭritmio estas arte adaptita ankaŭ al la regnoj de infana pedagogio kaj terapia kuraco. Dum la Azia Kongreso, la Eŭritmia Ensemblo Jerusalemo – arte reĝisorata de s-ino Jan Rank – montris, eble la unuan fojon dum la

La eŭritmia ensemblo prezentas dum la Azia Kongreso



mallonga historio de la du junaj movadoj, kiel aspektas poemo en la Esperanta lingvo eŭritmie, per originala koregrafio kaj gestoj komponitaj far la membroj de la ensemblo, kaj aldone muzikaj kaj alilingvaj komponaĵoj. Dum la IJK mi prezentis nome de la ensemblo spektaklon el la kreskanta Esperanta repertuaro de la grupo, kun hebrelingvaj kaj muzikaj komponaĵoj. Ambaŭ spektakloj estis akompanataj de voĉlegado kaj muzikludado. Enkonduke al la spektakloj, mi prelegis pri eŭritmio en Esperanto. Dum la IJK mi gvidis sep sperto-kursojn, al kiuj aliĝis multaj scivolemuloj; kelkaj el ili entuziasme daŭrigis tiun sperton, kelkaj eĉ estis interesitaj plu studi kaj praktiki ĝin en siaj hejmlandoj. Kio tiom specialas pri eŭritmio?

En eŭritmio oni kunlaboras kun la elementoj de homa parolo, muziko, spaca geometrio, koloroj, planta vivoforto, kaj multe pli. Praktikante eŭritmion, homo povas harmonie kontakti sian ĉirkaŭaĵon. Por la individuo ĝi evoluigas personan konscion kaj sanan ekvilibron. El socia vidpunkto eŭritmio ebligas al ĝiaj praktikantoj kaj spektantoj konscii kaj kontroli kiel oni influas la spacon en viva maniero, fortigante la vivan kunecon de la ĉeestantoj. La kvalitoj evoluigitaj en tiu praktiko de atento kaj konscia influo je ni mem kaj nia ĉirkaŭaĵo – spaca kaj homa, akompanas la praktikanton en ties ĉiutaga vivo kaj ebligas pli riĉe kaj atente trakti la vivon.

La riĉa mondo de la eŭritmio bele kongruas kun la vizioj de la Esperanto-agado en la mondo. Mi esperas, ke tiu speciala kaj nova kunlaboro prosperos kaj kontribuos al la plua evoluo de la homaro al paca vivado inter si kaj la ĉirkaŭa mondo.

Tali Wandel finstudis en la Eŭritmia Akademio Jerusalemo en 2012 kaj partoprenas en la Eŭritmia Ensemblo Jerusalemo, sub reĝisorado de s-ino Jan Rank.

Kial estas inde viziti en Israelo?

Joela Egozi

Israelo estas ideala feria lando. Kial?

1. Israelo estas mezorienta lando relative longa sed mallarĝa ĉe la Mediteranea Maro. Ĝi havas tre diversajn pejzaĝo-zonojn: norde staras la montoj, sude troviĝas granda regiono de dezerto, kaj inter la du zonoj laŭlonge de la lando ekzistas longa marbordo kun multaj belaj plaĝoj. Dum kelkaj tagoj oni povas viziti tre malsamajn lokojn (kutime, tia sortimento estas trovebla nur en grandegaj landoj aŭ en kontinentoj; kaj la vizito fariĝas pli longa kaj multekosta).

2. Oni havas tre varian veteron. Vintre en la nordo estas malvarme kaj en la altaj montoj foje eĉ neĝas, sed sude estas suna, varma vetero tutjare. Ĉiu povas elekti la lokon por sia ferio laŭvole.

3. Memkompreneble, Israelo estas alloga por ĉiaj sportemuloj, kaj ĝi estas paradizo precipe por akvaj sportoj. Norde – en la vintro oni eĉ povas skii. Sude,

ĉe la Ruĝa Maro, la urbo Ejlata estas mondfama pro la somera vetero dum la tuta jaro.

4. Israelo havas interalie specialan akvan kuracejon. Kelkaj eŭropaj landoj financas la terapion de haŭtmalsanoj, kiuj estas nekuraceblaj en tiuj landoj. La plej mondfama loko estas la Morta (Sala) Maro.

5. Israelo nomiĝas ankaŭ "Sankta Lando". Ĝi estas sankta por kristanoj, islamanoj, judoj kaj bahaanoj, kaj ĉiuj havas preĝlokojn, konforme al sia religio. Laŭlonge de la lando abundas sanktaj lokoj kaj antikvaĵoj, kiuj ligiĝas kun religiaj okazintaĵoj menciitaj en la Biblio kaj en la Nova Testamento.

6. La orientiĝo en Israelo estas facila, ĉar ni estas tre gastama, helpema popolo. La oficialaj lingvoj estas la hebrea kaj la araba, sed preskaŭ ĉiuj konas ankaŭ aliajn lingvojn, ĉar Israelo estas la domo de judaj elmigrintoj el la tuta mondo. Multaj vojindikoj, afiŝoj, ŝildoj, programoj, ekskursoj kaj eĉ gazetoj estas plurlingvaj, kvazaŭ konservante la rakonton pri la Turo de Babelo.

7. Israelo ofertas tre diversajn allogaĵojn kaj artan agadon de diversaj kulturspecoj: ĉambraj kaj simfoniaj koncertoj, operoj kun lokaj kaj eksterlandaj artistoj, dancarto (de klasika baleto ĝis modernaj dancoj), originalaj kaj tradukitaj prezentaĵoj, muzeoj kaj artaj galerioj.

8. La kuirarto estas tre varia. Ekzistas mediteraneaj manĝaĵoj apud la judaj tipaj pladoj, kiujn la enmigrintoj portis el siaj devenlandoj. Oni trovas manĝeblecojn por ĉies gusto kaj poŝo.

9. Ĉu Israelo estas sekura? Israelo maljuste estas malbone prezentata preskaŭ en ĉiuj mondaj amaskomunikiloj. Efektive, turistoj kiuj vizitas Israelon estas surprizitaj trovi tute pacan kaj trankvilan landon, kontraŭe al la bildo prezentata de la amaskomunikiloj en siaj hejmlandoj.

10. Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) membras en UEA. Oni povas renkontiĝi kun samideanoj, viziti la klubon en Tel-Avivo kaj gastigi ĉe esperantistoj.

Ni kore invitas vin veni al Israelo.



Bloge tra la Azia Kongreso en Israelo

Amri Wandel

Adaptita versio de la blogo

http://amri-esp.blogspot.co.il/2013_06_01_archive.html pri la historio de la 7-a Azia Kongreso, el la vidpunkto de organizanto, gvidanto kaj ĉiĉerono; ekde la komenca fazo de la planado ĝis la fino de la postkongresa ekskurso. Vi estas bonvenaj (re)sperti la kongreson!

Antaŭ la Kongreso

Mi ŝatus komenci per letero de Jomo, kiun mi ricevis nelonge post la kongreso:

Saluton kara Amri !!

Mi ankoraŭ ne havis la tempon skribi al vi por danki vin pro la mirinda kongreso en Jerusalemo. Ne gravas la pluvo, la etoso estis bonega, la diverseco de la originoj valoris, la ekskursoj ege interesaj.

La internacia vespero estis tute neforgesebla, eble la plej kortuŝa de mia vivo de esperantisto !!

Denove dankon,

Ĝis baldaŭ mi esperas (en Aŭgusto??)
Amike, j O m O

Multajn similajn mesaĝojn mi ricevis, rete kaj buŝe, post la Azia Kongreso kaj ĝia postkongresa ekskurso. Ili estis taŭga kompenco por tio, kio estis verŝajne mia plej granda Esperanto-projekto, plej granda laboro, sed ankaŭ plej feliĉiga sperto. Eĉ pli malfacila ol la organizado de la Universala Kongreso en Tel-Avivo en 2000, ĉar tiam kunlaboris multaj personoj kaj instancoj, UEA, LKK kaj profesia vojaĝagentejo. La Azian Kongreson devus



Jomo dum la AK

kunorganizi 4-persona teamo de ELI, kiu dum multaj jaroj organizis la Israelajn Kongresojn – Josi, Esti, Nava kaj mi. Sed batis la sorto kaj en la jaro antaŭ la Kongreso, el tiu teamo efektive restis mi sola. Bonŝance mi ne estis tute sola – en la monatoj antaŭ la kongreso multe helpis Jehošua, Gila, Tsvi, Esti kaj Jael, sed grandparte mi devis fari multege – informado, reklamado, varbado, buĝeto, programo, ekskursoj, kongresejo, salonoj, gastejoj, artistoj, dokumentoj, kongresa libro, postkongreso... Sed ni komencu ĉe la komenco.

"Ĉu Israelo ne troviĝas en Eŭropo?" estis la reago de pluraj aktivuloj de KAEM (Komisiono de Azia Esperanto-Movado de UEA), kiam antaŭ tri jaroj, relative novaliĝinta Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) invitis la 7-an Azian Kongreson al tiu fora angulo de Azio: ĝis tiam la plej okcidenta Azia Kongreso okazis en Nepalo. Tamen, dum la 6-a Azia Kongreso en Mongolio en 2010, KAEM oficiale decidis okazigi sian sekvan Kongreson en la jaro 2013 en Israelo. En Israelo ni ekplanis kiel ripeti la pozitivan sperton de la UK en Tel-Avivo, en la jaro 2000. La konstanta organiza teamo de la Israelaj Kongresoj komencis labori, kvazaŭ temus pri iom pli granda ol kutime landa kongreso. Por ne kolizii kun la UK kaj por eviti la someran varmon, la dato estis fiksita meze de aprilo (18-22.4.2013). Kiel kongresurbon ni elektis Jerusalemon, la plej turisme interesa urbo en Israelo. Tiu elekto ebligis oferti turisman kovron de la tuta lando ene de du semajnoj: antaŭkongreso en la norda parto, dum la kongreso duontagaj ekskursoj en Jerusalemo kaj apude, kaj postkongreso en la Morta Maro,

Eilat kaj Petra en Jordanio. En tiun turisman programon estis enplektita ankaŭ la kongresa temo: "Ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo". Kiel distra teamo estis kontraktitaj Kajto, kaj denove Jomo, kiu sukcesege koncertis en la pasintjara Israela Kongreso. La bezono informi al la tuta Esperantujo spronis la rapidan konstruon de nova retejo por ELI en 2011. En la paĝo <http://www.esperanto.org.il/ak2013.html> iom-post-iome akumuliĝis la informoj pri la Azia Kongreso: unua kaj dua bulteno, turisma programo, reta aliĝilo kaj listo de aliĝintoj.



Movada Foiro: ELI-budo en Hanojo

Somero 2012: La Ministerio pri Turismo helpis presi la unuan bultenon. En la UK en Hanojo mi disdonis mil ekzemplerojn (poste centoj estis disdonitaj en la IJK en Hanojo, en la Itala Kongreso en Aŭgusto kaj en la Internacia Festivalo en Germanio). En la hanoja UK mi prezentis la Azian Kongreson en pluraj programeroj: Movada Foiro, Azia agado, KAEM-kunveno kaj eĉ en la aŭkcio: la kongresa numero 1 estis aĉetita de finna sinjorino.

Septembro 2012. Reveninte al Israelo mi verkis la Duan Bultenon kaj kalkulis la kotiztabelon. La baza kotizo (por B-landoj en la unua periodo) estis 200 eŭroj inkluzive ĉion: loĝadon, manĝojn, programon kaj ekskursojn. Komence aliĝis nemultaj. Ni antaŭvidis 200 partoprenantojn, sed ĝis la fino de la unua periodo (1.1.2013) aliĝis malpli ol 80.

Januaro 2013. En la Internacia Festivalo ni okazigis Israelan Vesperon kaj tiuokaze varbis iom pli. Samtempe personaj kontaktoj kaj artikolo en la revuo Esperanto alportis pliajn aliĝantojn. La programon de la antaŭ-

dum- kaj post-kongresaj ekskursoj mi preparis surbaze de similaj ekskursoj, kiujn mi organizis en antaŭaj jaroj por la Israela Kongreso, sed multe plivastigis kaj riĉigis per mia sperto en profesia kurso por ĉiĉeronoj. Laŭ la modelo de la Israela Kongreso mi planis por la programo tri-partan skemon: en la mateno ĝis la posttagmezo – ekskursoj en kaj apud Jerusalemo, ĝis la vespermanĝo – kleriga programo (prelegoj), kaj post la vespermanĝo – arta kaj distra programo.

Februaro 2012. Iom post iom venis pliaj aliĝoj, sed ankaŭ pli da petoj kaj laboro. Mi verkis la Trian Bultenon kun provizora programo <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/ak2013tria-bulteno.pdf> Daŭre venadis demandoj kaj petoj: transportado el la flughaveno, tranoktado antaŭ aŭ post la kongreso, invitleteroj... Ni provis afable kaj pacience respondi al ĉiuj.

Aprilo 2012. La kongreso proksimiĝas, kaj la petoj fariĝas pli oftaj kaj urgaj. Jam estas 150 aliĝintoj. Ankoraŭ mankas Alta Protektanto. La oficejo de la prezidento Ŝimon Peres (Alta Protektanto de la UK en Tel-Avivo en la jaro 2000) longe prokrastis la respondon, sed fine afable rifuzis pro troa okupiteco. Mi skribis al la urbestro de Jerusalemo, Nir Barkat, kiu bonŝance akceptis, sed petis proponon de saluta teksto. Mi verkis proponon, kiun la urba parparolisto iomete modifis.



Alta Protektanto: la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat

Unu semajno antaŭ la kongreso.

Necesas produkti kongresajn sakojn, Kongresan Libron: <http://www.esperanto.org.il/dosieroj/ak2013kongresa-libro.pdf>., ankoraŭ mankas vizo por Ilia Dewi el Indonezio... Alvenas la unuaj partoprenantoj por la antaŭkongreso.

Kvar tagoj antaŭ la kongreso: dimanĉo 14.4. Gabi gvidas la unuan tagon de la antaŭkongreso: vizito en Malnova Jafo, la 4000-jaraĝa fratino de la juna, 100-jara, Tel-Avivo; la "Montpinta Parko", kun bela pejzaĝo de la marbordo de Tel-Avivo, kaj ties moderna promenejo kaj hoteloj. En unu el



LaTel-Aviva marbordo vidata el la malnova Jafo

ili, "Dan Panorama", okazis antaŭ 13 jaroj la 85-a Universala Kongreso. En la parko troviĝas la "Ponto de deziroj" – kun la zodiakaj signoj. Laŭdire, se oni metas manon sur sian signon kaj esprimas deziron, ĝi estos plenumota. Sekve oni promenis al la malnova haveno tra la "Zodiakaj Aleoj" kun abundo da arto-galerioj. De Jafo, la grupo iris buse kaj trajne al Hajfo, kie renkontis ilin Jehoŝua. Posttagmeze ĝi promenis tra la Germana Kolonio – bele restaŭrita setlejo de la Templanoj, el la 19a jarcento.

Lundo 15.4 – tri tagoj antaŭ la kongreso. La antaŭkongresa grupo veturas per buso al Akko. Kiel pri Jafo, ankaŭ pri Akko mi preparis detalan raporton kadre de la ĉiĉerona kurso, kiun mi sendis al Jehoŝua, la ĉiĉerono de tiu tago. Samkiel Jafo ankaŭ Akko estas antikva havenurbo, kun riĉa historio de 4000 jaroj; fenicoj, krucistoj kaj otomanoj. Ĝiaj imponaj

fortikaĵoj bremsis Napoleonon en 1799. La antaŭkongresanoj komencis sian viziton en la "Kavaliraj Salonoj", lastatempe malkovritaj kaj elfositaj krucistaj subteraj konstruaĵoj, la Moskeo de Ĝazar kaj la bunta bazaro – vera kultura kaj historia variaĵo. Sekve ili veturis al Roŝ-Hanikra kaj descendis per telfero por viziti belajn grotojn en la blankaj krutaj klifoj ĉe la maro, proksime al la landlimo kun Libano.

Mardo 16.4 – du tagoj antaŭ la kongreso. Mi ĉiĉeronis la antaŭkongreson en Nazareto kaj la Tiberiada Lago. Dum la busveturado de Hajfo al Nazareto mi disdonis al ĉiuj la kongresajn ĉapojn, kiuj en la antaŭa tago alvenis de la presejo. Nazareto estas la plej granda araba urbo de Israelo, kun 70,000 enloĝantoj, parte kristanoj kaj parte islamanoj. Ni vizitis la plej gravan lokon por kristanismo en Nazareto - la Preĝejo de Anunĉiacio. En tiu loko, laŭ la kristana kredo, la anĝelo anoncis al Maria ke ŝi estos graveda kun Jesuo. En la korto ni vidis tabulojn de Maria, donacitajn de diversaj popoloj, inter ili ankaŭ unu en Esperanto.



La antaŭkongresa ekskurso ĉe Preĝejo de Anunĉiacio

Sekvis veturo al la bela Tiberiada Lago, la plej granda dolĉakva lago de Israelo. Ni vizitis la muzeon de Genosar, kie ni spektis filmon pri la malkovro kaj restaŭrado de 2000-jara ŝipeto, el la tempo de Jesuo. Apude ni vizitis sur la Monto de Feliĉpromeso en la samnoma preĝejo, memore al la prediko de Jesuo, kun la ok frazoj "Feliĉaj estas tiuj, kiuj...". Katolika

ekskursano klarigis kaj citis el la Nova Testamento, laŭ la predikoj de sia pastro. Tuj apude ni vizitis Kapernaumon (modifo de la hebrea Kfar-Naĥum), kie Jesuo instruis kaj vivis en la domo de sia disĉiplo Petro. Kelkaj kuraĝis trempi siajn piedojn en la Tiberiada Lago, preskaŭ kiel Jesuo. Ni finis la tagon per vizito en kibuco Maagan, kie ni havis kortuŝan renkontiĝon kun la plej maljuna esperantisto en Israelo – Teddy (Cvi) Löwenkopf.



La ekskursanoj kun Cvi Löwenkopf en kibuco Maagan

Merkredo 17.4. La antaŭkongresanoj vizitis la Bahaajn Ĝardenojn en Hajfo kun Jehoŝua. Mi bonvenigis la unuajn kongresanojn alvenintajn al Tel-Avivo kaj sekve veturis al Jerusalemo por preni de la turisma ministerio cent mapojn kaj prospektojn por la kongresaj sakoj kaj por prepari la nomŝildojn.

Dum la Kongreso en Jerusalemo

Ĵaŭdo 18.4 – tagmeze komenciĝas la kongreso. Mi plenigas la ŝipon per sakoj kun materialoj por la kongreso kaj ekas al Jerusalemo. La vicurbestro respondas pri ĉeesto en la inaŭguro (vendrede): "eble". Mi provas telefone konvinki kaj fine sukcesas: la vicurbestro venos kaj salutos la kongreson. Dume, en la kongresejo jam alvenas la unuaj

kongresanoj kaj la akceptejo ankoraŭ ne estas preta. Bonŝance la unuaj helpantoj jam ĉeestas kaj ekorganizas laŭeble. Estiĝas kaoso en la akceptejo, ĉar la kongresa kasisto (Jehoŝua), kiu estas kun la antaŭkongreso, malfruas. Bonŝance Gila kaj



Gabi helpas pri la disdono de ĉambroj. Subite alvenas la ĉina altranga grupo kun la ĉina vicministro. Li volas havi kunvenon kun mi. Ni mallonge kunvenas en aparta ĉambro, oficiale fotiĝas kaj interŝanĝas kelkajn ĝentilajn frazojn en la Internacia Lingvo (la angla...).

KAEM petis ĉambron por kunsido, kaj mi akompanis la kongresanojn kiuj jam ricevis ĉambrojn, al la Muzeo pri la Bibliaj Landoj, kiu montriĝis tre interesa. Post reveno el la muzeo komenciĝis la prelega programo, kaj post la vespermanĝo la distra parto: kanto de Enrika kaj sekve la interkona dancvespero kun Jomo. Malfrue alvenis Ankie kaj Nanne (Kajto), rekte el la flughaveno. Mi kuris al la kuirejo por kunmeti regalon por ili el la restaĵoj de la vespermanĝo. Ne estis multe, sed bonŝance ili ne estas dorlotitaj... Post la dancoj – nokta filmo pri la avangarda poetino Jona Volah, subtitolita de Doron. Mi bedaŭrinde ne povis spekti ĝin pro helpado al Jehoŝua en la kalkulado de la kotizoj.

Vendredo 19.4. Matene ni veturis al la Holokaŭsto-Muzeo kaj Centro Jad Vaŝem. El la tri menditaj aŭtobusoj venis nur du, sed bonŝance sufiĉis, ĉar partoprenis nur cent kongresanoj. La vizito estis tre impona. Ni faris grupan foton en la placo de la Varsovia Getto, kie du semajnojn pli frue, en la memortago pri la Holokaŭsto, ni metis florkronon nome de ELI kaj UEA (vidu p. 46).



La Azia Kongreso en Jad Vašem

Tre kortuŝaj estis ankaŭ la vizitoj en la Memortendo de la mort-koncentrejoj, en la speciala malluma halo pri la murditaj infanoj kaj ĉe la statuo de Januŝ Korĉak. Fine ni vizitis la novan Holokaŭsto-muzeon, kie oni vidis i.a. la angulon pri la knabo Petr Ginz, kiu verkis en Esperanto. Sekvis vizito al la monaĥejo en Abu-Goŝ, kiun ni sukcesis atingi ĝustatempe por la rendevuo kun la benediktana monaĥo Frato Olivier [olivje], fama en Israelo pro sia humuro, rakontoj kaj kantado. Li parolis hebree kaj mi tradukis en Esperanton. Ni konis unu la alian de vizito antaŭ kelkaj jaroj dum la Israela kongreso, kaj Olivje aldonis al siaj ordinaraj spritaĵoj ankaŭ Esperanto-rilatajn anekdotojn. Sekve oni tagmanĝis en apuda restoracio – Abu-Goŝ estas konsiderata kiel unu el la plej bonaj lokoj por mezorientaj manĝaĵoj – kaj vere la tagmanĝo estis riĉa kaj bongustega. Revenvoje ni vizitis la Preĝejon de la Vizito (memore al la renkontiĝo de la gravedaj patrinoj de Jesuo kaj Johano la Baptisto) en Ein Kerem, kie ni vidis tabulojn kun la preĝo "Magnificat" en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Posttagmeze, post la reveno de la ekskurso okazis la inaŭguro de la Azia Kongreso. Mi legis la saluton de Probal Dasgupta, la prezidanto de UEA. Salutis ankaŭ la prezidantoj de KAEM, la eksa Teruhiro Sasaki kaj la novelektita Ruixiang Wang el Ĉinio, kie okazos la 8-a Azia Kongreso en 2016. Por iom kompensi la prokraston pro la malfrua reveno de la ekskurso kaj plilongiĝo de kelkaj salutoj mi spontanee anstataŭis la planitajn salutojn de reprezentantoj de ĉiuj landoj, kiel kutime en la inaŭguro de Universala Kongreso, per leviĝo de ĉiuj ĉeestantaj kongresanoj el ĉiu lando. Eble indas sekvi tiun modelon ankaŭ por la UK-inaŭguro. Sekve la vicurbestro de Jerusalemo pri kulturo kaj arto, Pepe Alalo, alportis la saluton de la urbestro Nir Barkat. La vicurbestro longe salutis ankaŭ sianome kaj multaj kongresanoj volis fotiĝi kun li. Por kompensi la perditan tempon mi cedis la propran prelegon "En la spuroj de Tibor Sekelj", kaj tiel oni sukcesis ĝustatempe atingi la Sabatan vespermanĝon. Ni aŭdis sabatan "Kiduŝ" far la rabeno de la gastejo. Sekvis la koncerto de Kajto, kiu tre plaĉis al ĉiuj ĉeestantoj.

Sabato 20.4. Matene – ekskurso al la Oliva Monto. Pli ol 100 kongresanoj venis al la observejo sur la Oliva Monto, kiu superrigardas Jerusalemon de oriente. Estas belega pejzaĝo de la Templo Monto kun la "Kupolo de la Roko" en ties centro (konata ankaŭ kiel "Moskeo Omar"), kun la ora kupolo, unu el la plej famaj simboloj de Jerusalemo. Pro tiu bela pejzaĝo oni faris grupan foton kun la Esperanto-flagoj. Sekvis vizito en la Preĝejo Patro Nia (konata ankaŭ per la nomo Eleona), konstruita fine de la kvara jarcento. Ĝi estas fama pro la preĝo "Patro Nia", kiu aperas sur ĝiaj internaj muroj en pli ol cent lingvoj,



Kongresanino ĉe "Patro Nia", Oliva Monto

inkluzive de Esperanto. Ni pluveturis al la Preĝejo Getsemane aŭ "Preĝejo de Ĉiuj Nacioj". La preĝejo havas belan kolorriĉan mozaikan fasadon. Sekve ni veturis al la fonto Far'a, el kiu fluas la rivero Kelt ĝis Jeriĥo kaj la Morta Maro. La plimulto de la partoprenantoj subeniris per natura, iom aventura kruta pado, dum la aliaj veturis per la busoj ĝis la parkejo, kie la du grupoj renkontiĝis. La natura promeno ebligis al la ekskursanoj konatiĝi kun la naturo, vidi monaĥejon kiu estas kvazaŭ gluita al la kruta roka murego, kaj fine aprezi la riveron kaj basenetojn. Survoje reen ni pasis ĉe la strato Zamenhof en Jerusalemo nomita pro la agado de aktiva jerusalema s-ano, kiu loĝis en tiu strato en la 50-aj.

Posttagmeze okazis la kleriga programo, kaj en ĝi elstaris la debato pri paco en la Mezoriento, gvidita de Renato Corsetti (vidu p. 5). Sekvis vigla diskuto, sed malgraŭ la malsamaj opinioj la etoso estis amika kaj bona. Post la vespermanĝo okazis komuna koncerto de Jomo kaj Kajto, kiuj kune kreis tre interesan kaj distran miksaĵon de kanzonoj, muziko kaj spritaj kantoj.



Kajto koncertas dum la Azia Kongreso

Dimanĉo, 21.4. Ni vizitis la antikvan Jerusalemon, urbo de tri religioj. Ĉar tiu ĉi ekskurso povas esti farata nur en malgrandaj grupoj, estis tri ĉiĉeronoj. Unu grupo kun mi, alia kun Olga, koleginio el mia lernejo de ĉiĉeronoj, kiu klarigis en la angla kaj unu el la partoprenantoj tradukis en

Esperanton. La tria grupo estis por la israelaj e-istoj, kun Inbal, same kolegino, kiu ĉiĉeronis en la hebrea. Unue ni vizitis la Templan Monton kun la du moskeoj: El Aksa, la tria plej sankta moskeo por islamanoj, kaj la Kupolo de la Roko, kun la impona ora kupolo. Ambaŭ estis konstruitaj en la sepa jarcento, en la frua islama epoko kaj havas belajn ekzemplojn de arabstila arkitekturo.



Azia Kongreso fotiĝis ĉe Omar-moskeo en la Templo Monto

Sur la Templo Monto staris la juda templo, detruita de la romianoj en la jaro 70pK, dum la granda ribelo de la judoj. La oktagona konstruaĵo de la Omar-moskeo markas la lokon de la Fundo-Roko, kie laŭ la tradicio Abrahamo devus oferi sian filon Isaako. Plue ni vizitis la "Via Dolorosa" – la vojo de Jesuo kun la kruco kaj ĝia lasta halto – la Preĝejo de la Tombo, konstruita en la bizanca tempo, detruita de la islama "freneza" reĝo (kalifo) Hakim Biamr Alla, kaj rekonstruita de la krucmilitistoj. De tie ni daŭrigis al la Okcidenta (Lamenta) Muro kaj la muraj tuneloj, kie oni elfosis la subajn ŝtonvicojn de la tempo de Herodo. Fine ni eniris la Centron Davidson – kun rekonstruo de la modelo kaj restaĵoj de la juda Templo. Ni vidis la Wilson-Arkon – kaj la falintan angulŝtonon kun la skribaĵo, ke tie la pastro trumpetis por signi la eniron de la sabato. Nekredeble: skribaĵo de antaŭ 2000 jaroj, precize kiel ĝi estas priskribita

en la Talmudo. Fine de la ekskurso Olga, la ĉiĉeronino de la dua grupo, faris adiaŭan kanton en Esperanto. Kompreneble, ŝi ricevis multajn aplaŭdojn...



La Azia Kongreso ekskursas ĉe la elfosaĵoj apud la Lamenta Muro

Post la reveno al la kongresejo okazis la posttagmeza kleriga programo. Dum la publika kunveno de KAEM pluraj el la reprezentantoj de aziaj landoj raportis pri la Esperanto-agado en siaj landoj.

Por la Internacia Vespero ni volis havi prezentaĵon de ĉiu el la 25 landoj en la kongreso, sed malgraŭ miaj ripetaj admonoj alvenis nur tri proponoj. Dum la vespermanĝo mi denove anoncis pri la bezono prezenti ion nacian de ĉiu lando reprezentata en la Kongreso, kaj okazis miraklo: iom post iom venis proponoj, pluraj eĉ POST la komenciĝo de la vespero! Kiam kongresanoj vidis, ke la programo estas sukcesa, pliaj demandis ĉu ili ankoraŭ povas kontribui, kaj kompreneble mi spontanee akceptis. Mi rearanĝis la restantajn programerojn kaj la novalvenintajn. La arta nivelo ne ĉiam estis elstara, sed la entuziamo kaj spontaneeco kompensis. La programo daŭris ĝis la 23-a, unu horon pli ol planite, kaj mi devis rifuzi la laste alvenintajn proponojn pro la malfrua horo. Tiu spontanea Internacia Vespero fariĝis unu el la plej gajaj kiun mi memoras. Kaj same diris multaj, ekzemple skribis Jomo: *La internacia vespero estis tute*

neforgesebla, eble la plej kortuŝa de mia vivo de esperantisto !! La sukcesa Internacia Vespero estis por multaj la pinto de la Azia Kongreso kaj inda finalo.



La Internacia Vespero fine de la Azia Kongreso

Lundo, 22.4. La lasta tago de la Kongreso komenciĝis per ekskurso al la nova, moderna Jerusalemo. Apud la Kneset – la israela parlamento – ni fotiĝis kun la Menoro – 7-branĉa kandelaro, la emblemo de la israela ŝtato (p. 4). Ni vizitis la apudan roz-ĝardenon kaj la modernan konstruaĵon de la Supera Kortumo. Fine ni promenis al la Israela Muzeo, kie ni vizitis tri elstarajn eksponaĵojn: la modelon de Jerusalemo antaŭ du mil jaroj, la "Palaco de la libro" – la 2000-jaraĝaj rulaĵoj trovitaj en Kumran apud la Morta Maro, kiuj enhavas la plej antikvan biblian tekston, kaj la novan ekspozicion pri la reĝo Herodo. Revene en la kongresejo okazis la ferma programo – bilda resumo de la Azia Kongreso, kiun mi preparis samtage; sekvis resuma debato dum kiu ĉiuj partoprenantoj povis esprimi sian opinion, sperton kaj kritikon pri la kongreso, kaj fine la solena fermo.

Pluraj kongresanoj, inkluzive de la tuta grupo por la postkongreso, restis ankoraŭ unu nokton en Jerusalemo, en alia gastejo – Agron – por tiu nokto. Post kiam mi aranĝis la ĉambrojn por ĉiuj en Agron, mi reveturis hejmen kun ĉiuj restantaj materialoj de la Azia Kongreso: kongresaj sakoĵoj, varoj de la libroservo, afiŝoj, flagoj... finita la Kongreso, sed la postkongresa grupo kiun mi estis akompanonta ne sentis sin adiaŭe: ankoraŭ dum 5 tagoj ni spertos Israelon kaj Esperantujon!

La post-kongresa ekskurso

Mardo 23.4. Buso kun pli ol 20 postkongresanoj foriris matene de nia gastejo en Jerusalemo. Kelkaj jam partoprenis la antaŭkongreson, ĉiuj kompreneble ekskursis kun mi dum la kongreso, do anstataŭ interkonatiĝo mi iom pli detale klarigis pri la plano por tiu ĉi tago. Veturante de Jerusalemo orienten al la Morta Maro oni eniras la dezerton kaj samtempe descendas pli ol mil metrojn. Ni haltis ĉe la alteco nulo, tio estas la marnivelo.



Tie oni havis la eblecon rajdi kamelon kaj fotiĝi, kion la tuta grupo volonte faris, inkluzive de la kamelo. La sekva halto estis la Urbo Jeriĥo, unu el la plej antikvaj urboj en la mondo. Urbaj restaĵoj estis trovitaj tie de antaŭ pli ol ok mil jaroj. Ni vizitis la palacon de Hiŝam, unu el la Omajadaj reĝoj de la frua islama epoko, kun belegaj mozaikoj kaj konstruaĵoj, kaj per telfero atingis la monaĥejon Karantal, kiu memorigas la kvardek-tagan tentadon de Jesuo far la Satano en la dezerto. Ni daŭrigis al Kumran, la loko kie estis trovitaj la skribulaĵoj de la Morta Maro, la

plej antikva teksto de la biblio, skribita de la Esena sekto en la tempo de Jesuo. Tie oni havis la okazon ankaŭ aĉeti kosmetikaĵojn faritaj el la mineraloj de la Morta Maro. Sekvis vizito en la oazo Ein-Gedi, kie ni agrable pasigis kelkajn horojn: la rivereto David, plena de akvo kaj akvofaloj, kaj sekve la plaĝo de la Morta Maro, kie ĉiuj lernis flosi en la plej sala lago de la mondo; ĝia akvo estas tiom densa, ke oni povas legi gazeton flosante en ĝi. Vespere ni atingis la gastejon "Masada", kie ni tranoktis.

La postkongresanoj en Masada ĉe la Heroda Palaco



Merkredo 24.4. Leviĝinte je la 5a matene ni ekgrimpis la monton de Masada per la "Serpenta Pado", por spekti la sunleviĝon super la montoj de Moab, ĉe la orieneta bordo de la Morta Maro. Sekve ni vizitis la elfositan palacon de Herodo, kie ĉ. mil judaj ribelantoj kontraŭstaris dum multaj monatoj la sieĝon de grandega romia armeo; kiam ne plu restis ŝanco kontraŭbatali, ili ĉiuj sinmortigis por ne esti kaptitaj de la romianoj. Ni pluveturis suden, survoje aŭdis pri la ekologia problemo de la Morta Maro, kies norda parto perdas ĉiujare pli ol unu metron de sia nivelo, dum la suda parto fariĝis vaporiga baseno por produkti mineralojn. Por sensalumi nin ni promenis tra la oaza rivero Bokek ĝis ties ĉarmaj akvofalo kaj baseno. Pli sude ni vidis sal-kolonon kiu nomiĝas "la edzino

de Lot" kaj eniris kavernon en la monto de Sodomo, la plej granda salmonto en la mondo. De tie ducent-kilometra veturado tra la ŝoseo Arava, laŭlonge de la limo kun Jordanio. Survoje ni haltis ĉe Moa, antikva dezerta gastejo de la Nabateoj, kiu servis la kamelo-karavanojn sur la "Vojo de Parfumo" el Petra al la Mediteraneo. Antaŭ ol alveni al Eilat ni pasis apud la dezert-besta rezervejo Jotvata-parko, kie libere paŝtas diversaj bestoj importitaj el eksterlandaj dezertaj regionoj kaj reloĝigitaj ĉi tie: struto, onagro (sovaĝa azeno), cervo ktp. Vespere ni alvenis al Eilat ĉe la Ruĝa Maro.



La postkongresanoj en Petra

Ĵaŭdo 25.4 – okazis tuttaga ekskurso al la nabatea antikva ĉefurbo Petra, en Jordanio. Matene ni trairis la limpasejon "Rabin" inter Israelo kaj Jordanio. Jordania aŭtobuso kaj gvidanto atendis nin, kaj post kelkhora veturado ni atingis Petra. Ni vizitis la faman Ruĝan Rokon – palaco fosita en la ruĝa sabloŝtono – kaj multajn similajn tombojn, la reĝajn palacojn; la pli kapablaj marŝantoj vidis ankaŭ la pli forajn "Monaĥejon" kaj la observejon, de kie videbas la israela Arava-regiono.

Vendredo 26.4 En la mateno ni vizitis la naturan roko-parkon Timna, kie ni vidis la antikvan procezon por produkti kupron kaj grimpis sur la imponaj granitaj kolonoj de Salomono. Tagmeze ni esploris la subakvan paradizon de la Ruĝa Maro en la rezervejo Almog, per maskoj kaj

spirtuboj. Posttagmeze ni grimpis piede sur la monto Cefahot, de kie ni vidis belegan pejzaĝon de la Eilat/Akaba-golfo kaj la kvar ŝtatojn: Israelo, Jordanio, Egiptio kaj Saud-Arabio. Vespere ni vizitis la promenejon laŭlonge de la plaĝo, kun multaj butikoj kaj amuzejoj, por impresiĝi de la bunta kaj vigla nokta vivo de Eilat.

Sabato 27.4. Matene ni vojaĝis al la Ruĝa Kanjono – kiun la naturo fosis en bela multkolora sabloŝtono kaj tragrimpis ĝin helpe de eskaloj. Ni veturis norden laŭlonge de la landlimo kun Egiptio kaj haltis ĉe la vizitocentro de Micpe-Ramon, kie ni povis impresiĝi de la krutaj rokoj de la kratero Ramon kaj de la muzeo pri la geologio kaj naturo de la regiono. Vespere ni alvenis al Tel-Avivo.

Konciza bildaro de la Azia Kongreso kaj Postkongreso

<https://picasaweb.google.com/104206151883892331911/AziaKongresoDeEsperantoIsraelo2013>

Impresoj de la 98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko

Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)

En la ĉi-jara UK partoprenis sep israelanoj, el ili Jinon salutis nome de Israelo en la Inaŭguro, Tsvi kaj Amri faris IKU-prelegojn, neniu reprezentis ELI en la Komitato de UEA, Amri reprezentis ELI en KAEM kaj raportis pri la Azia Kongreso. Ĥanan Bordin unuafoje partoprenis UK-n kaj Tsvi la trian fojon, sed li tamen trovis ion novan, pri kio li raportas ĉi sube. [La Red.]

Kiam mi partoprenis en la 96-a Universala Kongreso en 2011 en Kopenhago, mi trovis ion novan, kion mi ne povis vidi en la 94-a Universala Kongreso en 2009 en Bjalistoko, kiu estis por mi la unua Universala Kongreso. Ĝi estas la fakto, ke komuna lingvo sola ne sufiĉas por senproblema komunikado inter Esperantistoj, kiuj venas de diversaj malsamaj kulturoj. Kaj ĉi-foje en la 98-a Universala Kongreso en

Rejkjaviko mi eĉ prelegis pri tiu ĉi temo (la skriba teksto de la prelego troviĝas sur la jena paĝo:

<https://sites.google.com/site/tsvisadan/research/publications>; mi ankaŭ intervjuiĝis pri la temo ĉe Pola RetRadio:

http://pola-retradio.org/2013/08/e_elsendo-el-la-13-08-2013/).

Sed ankaŭ ĉi-foje mi trovis ion novan, kion mi ne povis vidi en la antaŭaj du Universalaj Kongresoj, en kiuj mi partoprenis. Ĝi estas la fakto, ke por multaj kongresanoj tiaj problemoj de interkultura komunikado en Esperanto nek ekzistas nek povas



ekzisti, ne ĉar ili scipovas "navigi" inter diversaj malmultaj kulturoj de aliaj kongresanoj, sed simple pro la jenaj du doloraj kialoj.

Unue, ŝajnis al mi, ke multaj homoj, kiuj aliĝis al la kongreso, simple ne venis al la kongresejo mem eĉ unu fojon. En tiu ĉi Universala Kongreso en Rejkjaviko aliĝis ĉirkaŭ mil homoj oficiale, sed mi ne pensas, ke eĉ kvarono aperis en la kongresejo! Mi nur povas imagi, kion tiaj "kongresanoj" faris anstataŭe - turismi en la kongresurbo kaj/aŭ en aliaj urboj en la kongreslando, ĉefe kun samlandanoj, parolante sian denaskan lingvon anstataŭ Esperanton!

Due, ŝajnis al mi, ke multaj kongresanoj, kiuj vere venis fizike al la kongresejo, uzis kaj/aŭ povis uzi Esperanton por tre bazaj celoj, kiel ekzemple, saluti unu la alian. Mi mem ne havis okazon ĉi-foje diskuti kun aliaj kongresanoj, almenaŭ ne en tia maniero, en kiu mi kutimas diskuti

kun aliaj talmudaj judoj, pri iuj seriozaj temoj, inkluzive de la temo de mia propra prelego, en la kongreseja "koridoro", kiu ne estis tiel "amikeca".

Tiuj du novaj trovoj pensigis min pri alia, esenca, demando: kial ili lernis Esperanton. Ĉu ili lernis ĝin nur por turismi kaj/aŭ uzi ĝin nur por tiel bazaj celoj? Mi mem eklernis Esperanton (en 1986) ĉefe por lingvistikaj kaj socilingvistikaj interesoj kaj neniam partoprenis en la Universala Kongreso ĝis 2009 en Bjalistoko, sed partopreninte en la Universala Kongreso la unuan fojon, mi trovis ankaŭ tute alian intereson en Esperanto kiel komunikilon kun homoj de malsamaj kulturoj! Tamen mi ne certas, kiom da kongresanoj interesiĝas kaj/aŭ povas uzi Esperanton por serioza dialogo aŭ diskuto.

Tiu ĉi penso kondukis min al alia, eĉ pli esenca, demando: ĉu Esperanto estas vere tiel facila lingvo, kiel multaj Esperantistoj propagandas. Mi pensas, ke ĝi estas pli facila ol etnaj lingvoj, sed tio ne signifas, ke ankaŭ absolute ĝi estas facila lingvo, speciale por tiuj, kies denaskaj lingvoj ne estas eŭropaj. Post la lernado de baza gramatiko oni devas konstante lerni novajn vortojn kaj ilian uzadon kaj plibonigi sian stilon. En tiu ĉi etapo ne estas granda diferenco inter Esperanto kaj etnaj lingvoj.

Konklude, mi devas konfesi, ke mi sentis, ke mi trovis ĉi-foje ankaŭ mallumajn flankojn de la Universala Kongreso. Tamen mi certe partoprenados en ĝi, se ne ĉiun jaron, esperante, ke mi havos multajn okazojn diskuti pri seriozaj temoj kun alikulturaj kongresanoj. Nun mi konscias almenaŭ, kio povas malebligi tion.

IJK en Nazareto

La Redaktoro

Ĉi-sube ni kopias artikolon pri la IJK verkita por revuo Esperanto de pola partoprenantino el la vidpunkto de TEJO. Ĉar mankas la raporto de la organizantoj mi aldonas resumon ankaŭ el la israela/organiza vidpunkto. La Internacia Junulara Kongreso okazinta en Nazareto estis organizita de rekorde malgranda LKK, gvidita de Meier (Sergeo) Goren; kvankam formale li estis kasisto, li faris aldone multajn aliajn taskojn. Malfacilaĵoj

ne mankis. La kongresejo devis esti transigita dufoje: unuafoje de Afikim al Nazareto malpli ol jaron antaŭ la kongreso (en pluraj kalendaroj en la reto la loko de la IJK restis Afikim ĝis ĝia komenco), kaj denove lastmomente (unu semajnon antaŭ la komenco!) al alia parto de Nazareto. Aliĝis malpli granda nombro ol antaŭvidite, kio kaŭzis problemon por la buĝeto. La viz-bezonantaj aliĝintoj ne povis ricevi la vizojn pro striko en la Ministerio pri Eksteraj Aferoj, kiu bonŝance finiĝis unu semajnon antaŭ la komenciĝo de la kongreso, sed tamen estis bezonata speciala interveno kaj laboro de la israelaj organizantoj. Spite de ĉiuj problemoj la kongreso estis sukcesa kaj havis bonegan etoson. La urbestro de Nazareto salutis en la inaŭguro, du novaj arabaj gejunuloj el Nazareto kiuj helpis en la organizado ekinteresiĝis pri Esperanto kaj partoprenis kelkajn vesperojn. Ĉ. 20 kongresanoj partoprenis la antaŭkongresan ekskursojn al Jafò, Hajfo kaj Jerusalemo, kaj simila nombro - la postkongresan ekskurson al Beit-Ŝean, la Morta Maro kaj Eilat.

TEJO kongresis en Israelo

Anna Maria Konieczpolska-Lachowska, Pollando

Aperis en la oktobra n-ro de revuo Esperanto

De la 19-a ĝis la 26-a de Aŭgusto okazis en Nazareto, norda Israelo, la 69-a Internacia Junulara Kongreso. La programo konsistis el artaj aktivaĵoj, ekskursoj, debatoj kaj prelegoj.

Varmega posttagmezo la 20-an de Aŭgusto. Ĉirkaŭe la partoprenantoj de la IJK ripozas post la tagmanĝo, oni spektas filmojn, partoprenas diversajn programerojn, ekscias kiel bone lerni kaj reklami Esperanton, diskutas, babilas, dibočas... Ne ĉiuj povas. La LKK-anoj devas zorgi konstante pri la tuta aranĝo – kontroli, helpi al la partoprenantoj trovi la bonan vojon... TEJO-anoj dume raportis pri la lastjaraj agadoj kaj preparis la planojn kaj manierojn por realigi ilin por la sekva jaro. Tie kaj tiam komenciĝis la laboro dum la 69-a IJK en Israelo; laboro, kiu estas, laŭ mi, la plej bona maniero por lerni pri kaj engaĝiĝi en la organizaĵon. La estraranoj prezentis al ni raportojn pri siaj agadoj; kion ili faris, pri kio ili ne sukcesis, kio estis bona kaj kio devas esti ŝanĝita. Post mallonga debato

ni elektis temojn, pri kiuj ni volas pensi, babili kaj decidi en malgrandaj grupetoj dum la sekva kunsido. Mi partoprenis unuafoje tian kunsidon kaj estis surprizita, ke energiplenaj, frenezaj junaj idealistoj povas ŝanĝiĝi kaj agi serioze, diskuti trankvile kaj profesie. Bone ke post tiu kunsido ĉio reenordiĝis, kaj la frenezaj junaj idealistoj restis la samaj. Niaj gastigantoj nutris nian sciaron ne nur per la kulturo de Esperantujo, sed ankaŭ per lokaj aferoj. Tial jam la unuan vesperon por ni kantis kaj ludis gitaron la loka araba artisto Viktor. Dum la sekvaj tagoj ni spektis kaj lernis tradiciajn dancojn de ĉerkesoj kaj la araban dancon "debka". Ni lernis pri judaj tradicioj, kiam ni vizitis la forlasitajn stratojn (pro la Ŝabato) de Safedo, pri Islamo en moskeoj, pri druzoj, ĥasidoj ktp.



La programo estis preparita tiel, ke kiu volis lerni pli pri la lando en kiu ni estis, povis spekti filmojn kaj partopreni prelegojn pri la politiko, naturo, ekologio, kulturo de Israelo. La sekvaj posttagmezoj estis plenaj de diskutoj kaj gravaj decidoj de la TEJO-estraro, komitatanoj de la Landaj Sekcioj kaj la anstataŭantoj. Ni elektis novan estraron kaj diskutis pri la plano por la sekva jaro. Instruaj estis la konversacioj en laborgrupoj, por kiuj ni unue elektis temojn: faka agado, landa agado, lingvaj rajtoj k.s.

Merkredo, la tago por laborgrupoj, estis fruktodona, la grupoj diskutas ankaŭ nun, post la kongreso, per Skajpo. Krom la multaj programeroj pri Israelo oni povis lerni pri utilaj laboroj kiel kudrado, dancado aŭ origamio. Mirinda lekciis, kiel interese kaj sukcese instrui Esperanton (kiel fari FaRo-kurson1); se oni volis ekscii pli pri la Esperanta kulturo, Dorotka respondis kaj ludis kun la freŝaj novuloj, kiujn ŝi samtempe instruis pri Esperantaj aranĝoj, kulturo kaj la bunta vivo de diversaj esperantistoj, sed vere senti la Esperantan kulturon oni povis ĉefe vespere, dum la koncerto de jOmO, dum la internacia vespero, dancante kaj diboĉante en la trinkejo aŭ en la gufujo trinkante teon faritan el herboj elektitaj de Tali. Dum tia internacia kaj interkultura evento ni ne povis resti nur ĉe la kulturoj loka, israela kaj Esperanta, preskaŭ ĉiuj volis prezenti siajn proprajn landon kaj kulturon, buntajn vestaĵojn (kiel vjetnaminoj kun "aozai", kiuj kovras ĉion kaj kaŝas nenion), donante tradiciajn trinkaĵojn / manĝaĵojn, aŭ farante ŝercan spektaklon (kiel germanoj pri la germanaj karaktero kaj specifa pensmaniero) kaj instruante nacian dancon (kiel brazilanoj kun "ciranda"). Nokte la estraro invitis nin al la kvizo pri TEJO. Kelkaj teamoj batalis per sia scio anstataŭ armilo: estis kelkaj, kiuj sciis kiel oni skribas la nomon de la nuna prezidanto; aliaj sciis, kiom da homoj legas *Kontakto* aŭ kiu estis ĝia unua redaktoro; sed ĉiuj bone sciis, kiom da jaroj havas nun *Kontakto*: 50! Bona konsilo: partoprenu IJK-n en Brazilo en la sekva jaro!

Mia unua kongreso

Daria Yoeli

Mi estas Daria, mi havas 16 jarojn kaj duonon kaj mi lernas Esperanton de unu jaro. Tio ĉi estas mia unua partopreno en IJK. Mi venis al la kongreso kun mia patro, kiu studas Esperanton kune kun mi. Kiam mia patro estis en mia nuna aĝo, li komencis lerni Esperanton, sed pro manko de interreto kaj Esperanto-lernolibroj li haltis kaj nur lastatempe rekomencis la Esperanto-kurson kun mi. Mi ne sciis kion atendi dum la kongreso, ĉu mi sukcesos paroli flue aŭ eĉ kompreni. Mi timis, ke mi sentos min sola kaj perdita pro nesufiĉa kono de la lingvo. Mia antaŭa kaj unua sperto de Esperanto-renkontiĝo estis en Aprilo dum la Azia Kongreso en

Jerusalemo, kaj tiam mi ekplanis partopreni la IJK-n. Eĉ kiam mi venis al Nazareto, mi ankoraŭ timis kaj ne estis certa, ke mi estas en la ĝusta loko; sed mi baldaŭ rimarkis, ke miaj timoj ne realiĝis. Ĉiuj estis tre agrablaj, kaj malrapide mi komprenis pli kaj pli la lingvon. La dumtagaj prelegoj estis interesaj kaj la vesperaj kaj noktaj distraj programeroj estis amuzaj. Mi ĝuis ankaŭ la ekskursojn. Mi kredas, ke vojaĝoj kunligas la plej bonajn personojn. Mi vere ĝuis tiun Kongreson, havis pozitivan sperton kaj neniam forgesos ĝin.

Post-IJK-ekskurso en Israelo: neforgeseblaj tagoj

Rafael Henrique Zerbetto, Brazilo

La postkongresa ekskurso en Israelo estis bonega. Dum kvar tagoj mi kaj aliaj samideanoj havis bonegan kaj nekutiman sperton pri la lando. Ĝi estis ankaŭ laciga, tamen mi certe farus tion denove.

Mi alvenis en Israelon la 17-an de Aŭgusto vespere. En la flughaveno de Tel-Avivo mi estis varme bonvenigita de Dror Gaon kaj kelkaj karegaj vjetnaminoj kiujn mi konis de la pasintjara UK en Hanojo .Dum la sekvaj du tagoj ni partoprenis en la antaŭkongresa ekskurso en Jerusalemo, poste la tuta grupo partoprenis en IJK, kaj finfine mi kaj diversaj esperantistoj profitis la oportunon ekskursi post la kongreso.

La organizantoj de tiuj ekskursoj estas gratulindaj pro sia laboro.



La ekskursoj estis planitaj tiel, ke homoj povus partopreni nur dum kelkaj tagoj, aŭ dum la tuta ekskurso, do fakte estis ekskursaro, kiu permesis al pli da homoj partopreni. Alia laŭdinda ideo estis tiu, ke la antaŭkongresa ekskurso donis al homoj la oportunon viziti urbojn, preĝejojn, muzeojn kaj tiel konatiĝi kun la historio de la lando kaj sperti la urban etoson. La postkongresa ekskurso, siavice, donis al ni unikan oportunon viziti lokojn malmulte konatajn eksterlande, vidi bestojn kaj plantojn, naĝi en riveroj kaj maroj kaj havi sperton tute nekutiman por ordinara turisto en Israelo.

Amri Wandel gvidis nin en la postkongresa ekskurso, kaj mi tre ĝojis kiam oni rakontis al mi, dum IJK, ke li estos nia gvidanto postkongrese, ĉar mi ŝategis lian gvidadon de nia grupo en Jerusalemo. Kaj tuj post la fino de IJK nia grupo plenigis buseton. Niaj grupanoj venis el diversaj landoj, tamen pere de la Internacia Lingvo ni kreis tiom fortan amikecan senton, ke nacieco estis nerimarkebla.

Beit-Ŝean estis la unua loko kiun ni vizitis, sub varmega suno, sed kun gustumado de granatoj prenitaj el granatarboj apud la ruinoj. De tie ni iris al Sahne, kie ni naĝis en naturaj basenoj kaj manĝis bongustan akvomelonon aĉetitan en Nazareto. Ni daŭrigis la vojaĝon suden kaj starigis nian kampadejon ĉe la Morta Maro. La nokta mallumo permesis al ni vidi la stelojn, kaj matene ĉiuj vekiĝis frue por vidi la sunleviĝon kaj naĝi antaŭ foriri.



La post- IJK en rivero Arugot

Matene ni vizitis la nacian parkon Ein-Gedi, kie ni iris per la rivero Arugot ĝis la kaŝita akvofalo kaj revenis per vojo tra kanjono ĝis la startpunkto.

Kelkaj kuraĝuloj ankaŭ iris de la kaŝita akvofalo ĝis la supraj basenoj dum aliaj preferis resti ĉe la akvofalo kaj ripozi. Dum la tagmanĝo Franco kaj tri vjetnaminoj adiaŭis nin. Mi sentas min forte ligita al tiuj vjetnaminoj, kaj tiu adiaŭo estis tre



La post- IJK-ekskurso en la Morta Maro kun *Kontakto*

kortuŝa por mi; mi rememoris pri la pasintjara adiaŭo, en la flughaveno de Hanojo, kiu estis eĉ pli kortuŝa, sed aliflanke adiaŭoj ebligas la ĝojon de renkontiĝoj.

Denove en la buso, ni iris suden ĉe la Morta Maro kaj vidis propraokule ĝian malgajan sorton. La Morta Maro iom post iom malaperas pro la homa avido, kaj apud la aŭtovojo videblas salgrundoj kaj salmontetoj, tamen, mortigo de la Morta Maro ne nur riĉigas kelkajn homojn, sed ankaŭ malriĉigas aliajn, kiuj profitas de turismo. Tie ni havis la lastan ŝancon baniĝi en la plej sala akvo en la mondo, tamen tie la akvo estis pli varma ol en la nordo, kaj ni ne sukcesis refreŝiĝi. Eĉ la plej etaj vundoj doloras pro la sala akvo.

Alvenintaj ĉe Masada, venis la momento starigi nian kampadejon, sed estis problemo: afiŝo avertis nin pri tio, ke tendumado estas malpermesata en la loko, kie ni planis tendumi, kaj ni tendumis en kaŝita angulo proksime de tiu loko. La nura strukturo, kiun ni havis, estis necesejo. Dum mi estis uzanta la necesejon, kelkaj araneoj falis el la plafono super mi. Mia korpo estis malpura, mi ŝvitis la tutan tagon ĉar estis varme, sed mankis duŝilo. Knabino diris al mi pri krano apud la necesejo, kie eblas preskaŭ duŝi, kaj mi revenis kun lanterno. Ĉiam, kiam ni bezonis iri necesejen, ni faris tion laŭeble plej diskrete, ĉar proksime estis gardista

budo kaj ni ne estis certaj ĉu nia kampadejo troviĝas en permesita loko. Sekvatage ni tamen malkovris, ke ĝi estis malplena. Kiam mi estis proksima al la necesejo, tri samideanoj antaŭ ĝi komencis amuze kuri sencele kaj freneze interparoli pri kion fari. Ili vidis mian lanternon kaj pensis, ke mi estis gardisto; ili tri estis en subvestoj uzantaj akvotubon kiel improvizitan duŝilon, kaj ankaŭ mi duŝis min tiel. Poste ni revenis al la tendaro kaj restis babilantaj sub la steloj antaŭ dormi. Amuza kaj neforgesebla nokto!

Sekvatage ni vekiĝis tre frue por atingi Masadan antaŭ la sunleviĝo. Dum la matenmanĝo ni malkovris, ke parto de nia manĝprovizo ne plu estis taŭga por manĝi, sed aliflanke ni estis inter daktilarboj plenplenaj je daktiloj, kaj ni kolektis sakon da daktiloj por tiu tago kaj la sekvaj. Supreniri la monton de Masada ne estas facile, tamen vidi la sunleviĝon de tie ja estas mirinda spektaklo. Amri rakontis al ni pri la historio de la loko, dum ni promenis inter la ruinoj, kaj poste ni revenis al la kampadejo por preni niajn aĵojn kaj daŭrigi nian vojon suden.

Eilat: 4-ŝtata observejo monto Cefahot

Ni refreŝiĝis en la rivero Bokek antaŭ ol daŭrigi la vojaĝon ĝis Sodomo, kie ni haltis dum kelkaj minutoj por viziti salokavernon. Poste ni vizitis la naturrezervejon Ĥai-Bar ĉe Jotvata, kie ni promenis per nia buseto inter la bestoj kaj piediris tra la rabobesta centro. Finfine ni alvenis al Eilat, kie ni starigis nian tendaron apud la Ruĝa Maro; ankoraŭ restis iom da tempo por naĝi antaŭ la sunsubiro.



La vespero en Eilat estis agrabla, ni promenis en la urbocentro kaj vespermanĝis en lunĉejo apud la maro. Tie mi manĝis bongustegan

hamburgeron. Ni ankaŭ vizitis luksan kvartalon por turistoj, kun imponaj luksaj hoteloj; tamen ni konkludis, ke estas pli agrable tranokti en tendoj sur la plaĝo kaj revenis al nia kampadejo. Mia lasta ekskursita tago komenciĝis per vizito al Timna-Parko, kie ni lernis pri antikva Egiptujo kaj pri la procezo ekstrakti kupron el rokoj. La homoj amuziĝis per plenigado de boteloj per kolorsabloj, artaĵo populara ankaŭ en la nordoriento de Brazilo, kie okazos la IJK venontjare.

La post- IJK-ekskurso ĉe la Solomonaj kolonoj, Timna



Ni vidis konglomerajn rokojn, la unuan fojon mi vidis rubujojn meze de la dezerto; post adiaŭi Juvelon, alia vjetnamino, kiun mi ekkonis en Israelo kaj kiu restis kun ni dum pliaj tagoj, ni vizitis la Ruĝan Kanjonon. Poste ni iris al la monto Cefahot, de kie eblas vidi kvar landojn, kaj revenis piede al nia tendaro sufiĉe frue por profiti la maron. Sub la akvo la pejzaĝo estas belega, kun belaj fiŝoj kaj koraloj, tamen miaj piedoj vundiĝis pli. Vespere okazis nia adiaŭa vespermanĝo en simpla manĝaĵvendejo sub tendo, tiu loko plaĉis al mi. Ni bone manĝis kaj agrable babilis, sed la grupo estis multe malpli granda ol komence de la vojaĝo, ĉar ĉiutage minimume unu homo lasis nin pro la neceso forvojaĝi. La sekva tago estus la mia, do mi interkonsentis kun kelkaj aliaj pri lasta naĝado matene. Finfine, alvenis la

momento adiaŭi, sed ni, du brazilanoj kaj du rusinoj, decidis kune vojaĝi al Tel-Avivo, de kie mi kaj mia amiko Allan forvojaĝis.

Venontjare la IJK okazos en Brazilo, kaj mi estas unu el ĝiaj organizantoj. Estos granda plezuro bonvenigi vin en mia lando kaj denove amuziĝi kun samideanoj el la tuta mondo. La kongreso okazos inter la 18-a kaj la 26-a de Julio en la marborda urbo Fortalezo, kiu troviĝas proksime de la plej belaj plaĝoj de Brazilo. Bonvolu ŝat-klakii ("like") nian IJK-paĝon ĉe Facebook (facebook.com/ijk2014) kaj viziti nian retejon de tempo al tempo por scii la lastajn novaĵojn. Ĝis Fortalezo!

Mondpremiero: akvomelono "Esperanto"

Gian Piero Savio

En la Landa Kunveno de Esperanto-Ligo en Israelo okazinta la 1.7.2013 oni havis riĉan artan kaj prelegan programon, sed la plej bongusta frandaĵo estis monda inaŭguro agrikultura - nova specio de akvomelono evoluigita en Israelo, kiu oficiale portas la nomon "Esperanto". Ĝia historio (iniciato de s-anino Malka Zemeli) estas ĉarme prezentita de Gian Piero Savio en la ĉi-suba artikolo. Tiu ĉi artikolo, kune kun la akompana sonstrio, aperis ankaŭ en Ĉina Radio Internacia, <http://esperanto.cri.cn/621/2013/07/12/165s151799.htm> [La Red.]

Malka (esperante: "reĝino") Zemeli estas samideanino nekredeble aktiva kaj firme celstrebanta. Dank' al sia agado en la Akademio de la hebrea lingvo kaj, sekve, al sia aliro al multenombraj registaraj institucioj, ŝi jam havis kelkajn elstarajn atingojn por publike konatigi Esperanton. Antaŭ pli ol du jaroj, ŝi decidis, ke iu noviga agrikultura produkto devus esti oficiale nomata "Esperanto" kaj ekagis! Lastjare en la jara agrikultura foiro, oni oficiale prezentis novan varion de akvomelono nomatan "Esperanto", sed temis ankoraŭ pri eksperimenta kultivado.

Je la komenco de 2013 oni ekkultivis ĝin grandskale en la dezerto de Aravà. Ni esperis prezenti kaj gustumigi ĝin al la partoprenantoj de la

Azia Esperanto-Kongreso, kiu okazis lastaprile en Jerusalemo. Sed la esperantaj akvomelonoj ne estis ankoraŭ maturaj. Ĝuste la tagon antaŭ la tutlanda somera kunveno de ELI (Esperanto-Ligo en Israelo), oni informis nin, ke ni ricevos du akvomelonojn. Kaj fakte el la suda dezerto, pere de nia amiko agronomo, ili vespere atingis Tel-Avivon. Mia misio estis veturi por ricevi ilin kaj tagon poste porti ilin al nia kunveno. Nu, mia tasko ŝajnis tre banala, sed nekredeblaj trafikŝtopiĝoj kaŭzis, ke la nura veturado al la alia ekstremo de la urbega areo postulis preskaŭ du horojn.

Bone! Finfine, malfrue vespere, la du alstrebataj kaj grandvaloraj akvomelonoj troviĝis en la kofrujo de mia aŭtomobilo kaj mi ĝoje ekveturis hejmen. Sed "homo proponas kaj Dio disponas" -- ĉe semafora halto, alia veturilo postkoliziis kun mia aŭto kaj, sekve, la kovrilo de mia kofrujo plene blokiĝis. Bonŝance mi ankoraŭ povis veturi kaj atingi mian hejmon.



Kaj kion fari nun? Kiel eltiri la akvomelonojn el la hermetike fermita kofrujo por ilin fridigi? En mia tre malnova "Peugeot 306", ja estas aliro al kofrujo tra la postaj renverseblaj seĝoj, sed iliaj blokiloj troviĝas ĝuste en la interno de la hermetike fermita kofrujo! Tamen, laŭ la dirmaniero "provi ne malutilas", mi decidis provi renversi la blokitaĵajn seĝojn kaj, laŭ la alia loka dirmaniero "se vi ne sukcesas per forto, provu per pli da forto", mi finfine sukcesis renversi unu el ili kaj forpreni la akvomelonojn.


Do, vi povas vidi en la supraj bildoj kiel, la postan vesperon, en nia tutlanda kunveno ni mondpremiere festis kaj frandis la novajn tre bongustajn akvomelonojn "Esperanto". Des pli, ke temis pri escepta ununura ebleco por gustumi ilin, ĉar ili estas ekskluzive rezervitaj por eksportado.

Memorceremonio en Jad Vaŝem: ELI kaj UEA estas anoncataj unuafoje en Esperanto

Amri Wandel

La 8-an de Aprilo okazis en la Varsovia Placo en Jad Vaŝem la tradicia memorceremonio pri la Holokaŭsto. Ĉi-jare oni menciis ankaŭ la 70-an datrevenon de la ribelo en la Varsovia Getto , kaj la 60-an datrevenon de la fondiĝo de Jad Vaŝem (la ŝtata institucio por memorado kaj edukado pri la Holokaŭsto).

Doron, Malka kaj Amri kun la anoncanto Beni Hendel dum la ceremonio en Jad Vaŝem



Kurioze, dek unu tagojn poste, sur la sama placo kaj precize en la dato de la Gettoa Ribelo, vizitis la ekskurso de la Azia Kongreso. Jam la naŭan fojon reprezentantoj de ELI (ĉi-jare Malka Zemeli, Doron Modan kaj Amri Wandel) metis florkronon nome de ELI kaj UEA. Ĉirkaŭ cent ŝtataj kaj aliaj instancoj metis florkronojn, inter ili la prezidento Peres kaj la ĉefministro Netanjahu. Post la pasintjara ceremonio mi kontaktis la organizantojn kaj sugestis, ke oni anoncu la organizojn UEA kaj ELI ankaŭ en Esperanto. Aŭskultu la perfektan prononcon de la anoncanto Beni Hendel en youtube: http://youtube/ebQwvCc_v14.

ELI funebras: Esti Saban (1963-2013)

Amri Wandel



Esti Saban (1963-2013) mortis la 20-an de Junio en Jafo (Israelo), kie ŝi estis UEA-delegito ekde 1999. Ŝi estis LKK-ano de la 85-a UK en Tel-Avivo (2000) kaj longtempa membro de la Komisiono pri Azia E-Movado de UEA kaj estrarano de E-Ligo de Israelo.

La ĉi-supra lakona nekrologo pri Esti aperinta en la oktobra n-ro de *Esperanto* ne povas plene reflekti la sentojn de ŝiaj geamikoj kaj gekonatoj. Ni doloregas la forpason de Esti, nia kara kaj energi plena amikino kaj fervora s-anino. Unu jaron post la foriro de Josi, ELI (kaj la multaj e-istoj en la tuta mondo kiuj konis kaj amis ŝin) perdas plian mirindan personon; ĉiam aktiva, optimisma, helpema, ŝatata de ĉiuj. Post longa lukto la malsano fine venkis, sed preskaŭ ĝis la lasta momento Esti provis kiel eble helpi kaj kontribui, eĉ en la organizado de la Azia Kongreso, en kiu ŝi mendis ĉambron, kiu bedaŭrinde restis malplena, ĉar ŝia sanstato ne plu permesis vojaĝi. Jen parto el ŝia adiaŭa letero al la estraro de ELI, en kiu ŝi agadis dum multaj jaroj:

לאור מצבי הבריאותי והתקופה הארוכה, שאיני משתפת בשיבות הועד, אני מודיעה על עזיבתי את הוועד -- כמובן שאמשיך לתרום בהתאם לצורך ולמצבי...

Pro mia sanstato kaj la longa foresto el la kunsidoj mi demisias de la estraro de ELI – kompreneble mi plu kontribuos laŭnecese kaj laŭ mia stato ...

...תמיד אחרי כנס (ואני גאה בכך שלפחות בהבאתו לכאן יש לי חלק) שהוא סוג של שיא יש הרגשה של "נפילה", אך בטוחה אני שאנו נפיק לקחים ונשתפר פשוט בגלל החיבור האוהב של כו ו ל נו לאספרנטו...

... Ĉiam post organizado de konferenco [la Azia Kongreso] (kaj mi fieras, ke mi respondecas almenaŭ pri ĝia venigo al Israelo) estas sento de falo, sed mi estas certa, ke ni eltiro la konkludojn kaj pliboniĝos...

נפרדת לא נפרדת, חיבוק לכולם - אסתי או אסתי לא

Adiaŭas kaj ne adiaŭas, brakumon por ĉiuj

Esti aŭ ne Esti [vortludo pri ŝia E-karesnomo, "Esti aŭ ne"]

Esti ne plu Estas kun ni, sed en nia memoro ŝi ĉiam restos.